



La Granda Aventuro; Ferenc Szilágyi. Eldonisto: Hungara Esperanto-Asocio. 151 paĝoj. £5.50.

La unua eldono de ĉi tiu libro aperis en Svedio en 1945 baldaŭ post la fino de la milito kiam la esperantistoj post ses jaroj de magraj literaturaĵoj, soifis por novaj libroj en la lingvo. La libro de Szilágyi elĉerpiĝis relative rapide kaj dum jaroj ĝi ne estis aĉetebla.

Ferenc Szilágyi estas inter la klasikaj verkistoj de nia literaturo. Li jam debutis apud Kalocsay en la oraj jaroj de “Literatura Mondo”. En 1938 li lasis Budapeŝton kaj iris loĝi en Svedio. En ĉi tiu lando li lanĉis en 1954 la revuon “Norda Prismo” kiun li redaktis kaj vartis dum pluraj jaroj. “La Granda Aventuro” apartenas al la periodo antaŭ “Norda Prismo”, la dek-tri rakontoj kaj du “groteskaj komedioj” kiuj formas la libron estinte verkitaj, proksimume, inter la jaroj 1930 kaj 1945. La rakontoj, laŭ la aŭtoro, estas bonhumoraj, malgajaj, satiraj aŭ tragediaj, ĉar, li diras “Ankaŭ la vivo estas tia.” En ĉiu rakonto ni trovas kortuŝecon. La unua, kiu donas la nomon al la libro, temas pri junulo en granda urbo, Budapeŝto sendube, estinte tiam la hejmurbo de la aŭtoro, sed ankaŭ povus same esti Vieno, Berlino aŭ Londono dum la depresio de la tridekaj jaroj. En la tago de la rakonto la heroo, Karlo, planas perfidon kontraŭ la familio akceptinte senpagan bileton por la komuna help-mangeĵo, al kiu la gepatroj, malgraŭ la bezono, rifuzis iri preferante konservi “sian sinjorinan majeston”. Ĉu iu leganto aŭdis similajn komentojn rilate al helpmangeĵoj en Britio de avo aŭ avino kiam ili rememoras la depresion?

La rakontoj tuŝas multajn partojn de la homa vivo, priskribitajn per simpla rekta prozo tamen eleganta kaj belsona. Ni povas legi pri kaŝita amaventuro, pri la streboj kaj ruzaĵoj de homoj kiam oni devas akiri provizojn malabundajn, pri la malvarmo de la vintro, pri eblaj konsekvencoj helpante studenton korespondi kun amikino, pri la tago, en Svedio, kiam oni atendas la anoncon ke la milito finiĝis en Eŭropo, kaj aliaj situacioj, detale ekzamenitaj de Szilágyi kaj priskribitaj montrante eretojn ofte mistrafitaj de homoj tro okupitaj aŭ pigraj por percepti ilin. Li ne nur vidas ilin sed ankaŭ vortumas ilin en delikatajn skribitajn miniaturojn. De tempo al tempo oni trovas vortojn kiel “karbvendejo” en kiu tri sinsekvaj konsonantoj malhelpas la prononcadon de la vorto; mi opinias ke “karbovendejo” estas kaj pli belsona kaj pli facile por prononci, aŭ eble tio estas parto de mia latinida lingva heredaĵo?

La du “groteskaj komedioj” estas satiroj pri lokaj esperantaj kluboj sed ili ne atingas la nivelon de lia samtempulo Raymond Schwartz, kaj hodiaŭ, jam pasinte almenaŭ kvardek jaroj post ilia verkado, kiam oni povas gustumi satirojn garnitajn per pli subtilaj pikantaĵoj, ili aperas iom krudaj. Tamen la valoro de la dek-tri rakontoj jam estas sufiĉa instigo por legi la libron kaj frandi bonajn, kortuŝajn vinjetojn el la homa vivo.

Amador Díaz

